



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 42-9090
70.000 - Brasília (DF)

CGC N°
00406 504/1000-06

SETEMBRO DE 1979

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 48

REDAÇÃO: Maria Almada

ROLO DE LA VICPREZIDANTOJ (Klarigo)

Kelkaj personoj ne komprenas la strukturon de la Brazila Konsilantaro de Esperanto kaj pro tio ili ofte fuŝe interpretas la agadon de la plej aktiva landa organizaĵo.

Ni decidis iom klarigi al niaj gesamdeanoj la laboron de niaj vicprezidantoj, kiuj vere havas rolon de la delegita reto de UEA, sed nur en nia lando. La Brazila Konsilantaro de Esperanto konsistiĝas el 28 organizaĵoj, kiuj harmonie kunlaboras. Ĝis nun ne havas individuajn membrojn, sed posedas 73 vicprezidantojn, kiuj vere estas nur kunlaborantoj. Ili ne havas rajton voĉdoni, nur la prezidantoj de la 28 organizaĵoj havas rajton voĉdoni por elekti la estraron.

La Brazila Konsilantaro de Esperanto, laŭ sia statuto pretas kunlabori eĉ helpi al la organizaĵoj aŭ vicprezidantoj organizigi kunvenojn, informi ilin pri la instruado de la lingvo kaj pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj fakultatojn. Fine kunlabori kun ĉiuj organizaĵoj landaj aŭ ŝtataj kaj helpi ilin.

La oficiala organo de BKE estas ĝia monata Bulteno, kiu aperigas ĉiujn novaĵojn, kiujn ricevas de siaj kunlaborantoj kaj helpantoj.

La vicprezidantoj estas menstaraj personoj, kiuj libere kaj demokrate povas agadi en siaj regionoj kaj pri ilia laboro ili respondecas persone.

Ili rajtas kaj estas dezirinde ke ili propagandu pri Esperanto, instru la lingvon, organizu kunvenojn en la nomo de Brazila Konsilantaro de Esperanto. Ili ne rajtas fari ŝuldojn en la nomo de BKE. La direktoraro de Brazila Konsilantaro respondecas nur pri la monpeto aŭ promeso, kiam la peton subskribas la prezidanto F. S. Almada kun la ĝenerala sekretario Nelson Pereira de Souza kaj Carlos A. Siqueira da Cunha, financa direktoro de BKE. Sen la menciitaj subskriboj la direktoraro de BKE ne respondecas pri la faritaj promesoj aŭ ŝuldoj de ĝin konsistigantaj organizaĵoj aŭ vicprezidantoj. BKE ek de ĝia starigo korekte agadas, ĉion publikigas en la Bulteno kaj ŝuldas al neniu.

La direktoraro de la
Brazila Konsilantaro de Esperanto

- x - x - x - x - x -

**I-a KONGRESO DE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
KUNLABORE KUN ESPERANTO-KULTURA ASOCIO-JUIZ DE FORA.**

En la jaro 1980-a, dum la Sankta Se-

majno, Brazilia Konsilantaro de Esperanto okazigos sian unuan kongreson, en la urbo Juiz de Fora (MG) kune kun la tiea esperanta oraganizajo.

Prezidanto F. S. Almada kaj Mag. José Passini invitis la rektoron de la Federacia Universitato de Juiz de Fora por patroni la eventon. Prof-ro D-ro Sebatião de Almeida Paiva akceptis la inviton kaj permesis la okazigon de la laboroj en la rektorejo de la Universitato.

La urbestro de Juiz de Fora, D-ro Francisco Antonio de Mello Reis, estas invitita por honora prezidanto de la kongreso.

Ni planas starigi buston de L.L. Zamenhof en tiu ĉarma urbo. La buston donacis Kultura Kooperativo de Esperantistoj, laŭ decido de ĝia prezidanto, D-ro Braz Cosenza.

La kongreso havas kulturan kaj instruon karakteron. Prelegos niaj plej elstaraj kaj konataj gesamideanoj. La evento celas esti heroldo de nia Universala Kongreso en la jaro 1981-a, en Brazilja, kaj pro tio ni klopodas prepari, pere de interŝanĝo de ideoj, de debatoj, de klarigoj, niajn gesamideanojn.

Aparte oni volas diskuti la plej grandajn malfacilaĵojn en la organizado kaj instruado de la Esperanto-kursoj, inter la instruantojn de la internacia lingvo.

Okazos "ronda tablo" kun kunversacio kaj klarigoj pri korekta prononco de Esperanto.

Estos artaj aranĝoj kun muziko, vizito al historia muzeo, kaj aliaj distraĵoj.

Dimanĉe, por fermi la kongreson, la interesatoj veturos al Volta Redonda (RJ) kie oni vizitos la urbon kaj la Siderurgian Kompanion (instalajojn).

D-ro Alberto Flores, vicprezidanto de BKE, organizos la kunvenon lak la viziton al Volta Redonda. Dank'al li la Kompanio ĝentile ofertas interfraternigan senpagan tagmanĝon al vizitontoj, kaj tie solene ni fermos nian kongreson.

Ni petas niajn gesamideanojn, volu partopreni amase la kongreson, ĉar ni devas

propagandi pri nia movado en Juiz de Fora kaj Volta Redonda, kie estas Universitato kaj Fakultato instruantaj Esperanton.

Ni esperas revidi ĉiujn niajn karajn gesamideanojn. Memoru, ke la plej bela Pasko estas la renkontiĝo de pacaj batalantoj.

NOVAJ VIC-PREZIDANTOJ

Lastatempe estis nomumitaj la novaj vicprezidantoj, kiuj jam kinlaboras kun BKE. Jen iliaj nomoj: - Lair Alves Moreira, Orlando José Lopes Junior, Sergio Luiz Santos, D-ro Enivaldo Alves Silva kaj Gilson Villas Boas, respektivaj fakoj: Elektroniko, Bankaj Aferoj, Interrilatoj pri Esperanto, Radiamatorismo kaj Disvastigado kaj Instruado de Esperanto.

- x - x - x - x - x -

MONO RICEVITA

Por helpi la aperon de nia I. Bulteno, ni kore dankas la jenajn kontribuajojn:

Claudio Zimmermann	Cr\$ 100,00
Elvira Fontes	200,00
Maria Almada (esperantaĵoj) . . .	120,00
Guiomar de Aquino	100,00

Sumo 520,00

- x - x - x - x - x -

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas, la jenajn periodaĵojn:

Cidade do Rio Claro, Jornal do Touring, O Líder, Diário da Tarde, Correio Fraternal do ABC, Diário Popular, Sul do Estado, A Tribuna kaj Svisa Fervojisto.

- x - x - x - x - x -

ĈU 3974 ESPERANTO-KLUBOJ EN BRAZILLO ?

D. P. Souza

Vizitante la ĉefurbon Brazilja, ni eniris en librovendejon de I.B.G.E. (Brazilia Instituto por Geografio kaj Statistiko). Tie ni trovis Statistikon Jarlibron 1978, kiu montras la nombron de la nuntempe ekzistantaj urboj en Brazillo: 3974. Do estas esperebla, ke la longjara laborado de la esperantistoj rezultis la fondadon de tiom da kluboj, eĉ pli, ĉar la grandaj urboj kapablas akcepti plurajn societojn, inkluzive fakajn. Sed tio ne okazis, laŭ la lasta numero de "Koopertivismo" (Julio 1979) ekzistas en Brazillo 51 urbaj societoj. Ĉu nur 51? Jes, tiel diŝe: 2 en la norda regiono (Amazonas, Acre, Pará, Amapá, Rondônia kaj Roraima); 7 en la nordorienta (Maranhão, Piauí, Ceará, Rio Grande do Norte, Paraíba, Pernambuco kaj Alagoas); 33 en la orienta (Sergipe, Bahia, Espírito Santos, Rio de Janeiro, Minas Gerais kaj São Paulo); 6 en la suda (Paraná, Santa Catarina kaj Rio Grande do Sul), kaj 3 en la okcidenta (Mato Grosso, Mato Grosso do Sul, Goiás kaj Distrito Federal).

Sekve ni havas Esperanto-klubojn en nur 1,3% de la urboj brazilaj, ververe tre malmultaj. "Kie vi estas, kion vi faras, ho, karaj fratoj vi miaj?" Ĉu vi aŭdas la voĉon de la Majstro? Ĉu vi ne opinias, ke estas tre malmulte? Kaj denove ni aŭdas la voĉon de Lazaro Ludoviko Zamenhof: "Vi en la urbo, vi en urbeto, / En la malgranda vilaĝo, / Ĉu ne forflugis kiel bloveto / La tuta via kuraĝo?"

Ne permesu, ke vi lacaj perdu la esperon! Fondu tuj Esperanto-Klubon en via urbo aŭ urbeto!

- x - x - x - x - x -

SPIRITA SOCIETO "F. V. LORENZ"

Ni ricevis libron, eldonitan de tiu societo, verkita de D-ro Nassif Isaac, titolita

"La Mortintoj kaj la Mortantoj", kiu estas tre interesa legaĵo. Pere de ĝi ni sukcesis kompreni iun problemon, kiu al ni neniam estis klara. Ni rekomendas, kiel seriozan kaj kiel samtempe legindan verkon.

Ĝi estas renkontata en "Spirita Eldona Societo "F. V. Lorenz" - Caixa Postal nº 3133 - 20.000 - Rio de Janeiro (RJ).

- x - x - x - x - x -

TRA BRAZILLO

FORTALEZA (CE) — Nia vicprezidanto Prof-ro Paulo Amorim Cardoso informas nin, ĵus aperis la libro "BAHÁ'U' LLÁH KAJ LA NOVA EPOKO" - tradukita de filino de Zamenhof, s-ino Lydia Zamenhof (Prezo: Cr\$ 110,00).

Same interesa libro estas eldonita de Prof-ro Amorim Cardoso, en portugala lingvo "Destruindo a Torre de Babel", kiu estas bonega propagandilo por nia movado.

Ĉe la Federacia Universitato de Ceará li gvidas Esperanto-kurson. Krome li organizas korespondan kurson, kiu kostas Cr\$ 280,00 kune kun la materialo.

Interesatoj turnu sin al Prof-ro Paulo Amorim Cardoso - Caixa Postal 1221 - CEP 60.000 - Fortaleza (CE).

Ni Kondolencas

Pro aŭtomobila akcidento mortis en Fortaleza s-ano Arlindo Jacinto da Silva, la 26-an de majo pasinta. Ni kondolencas lian familion.

MACEIÓ (AL) — S-ano Alves Matta, nia diligenta vicprezidanto kaj kunlaboranto transloĝiĝis al alia urbo kaj lin anstataŭas Prof-ro D-ro Tobias Medeiros, kiu daŭrigas la laboron, kiel vicprezidanto de "Associação Alagoana de Esperanto".

Ekzistas Esperanto-kursoj, kiujn priorgas la gesamideanoj Maria José Cavalcanti de Castro, Zuila Gomes de Araujo Correia, Rôzano Giuseppe Ferreira Arecipo kaj Paulo Roberto Olegario de Souza. Ni deziras plenan sukceson al la bonaj alagoanoj.

SALVADOR (BA) — Bahia Esperan-

to-Asocio bonege agadas. Ni ricevis sciiĝojn de nia kara vicprezidanto Sergio Luiz S. Santos, bonega kunlaboranto nia, informante ke en Alagoinhas (BA) oni fondis kaj inaŭguris la "Alagoinhas Esperanto-Klubon".

Krom la prezidanto de Bahia Esperanto-Asocio, inĝeniero Isao Noguti, Valdina Caymmi, Manuel Borges aperis pluraj profesoroj okaze de la solena inaŭguro.

La urbestro de Alagoinhas, s-ro Miguel Fontes, faris festparoladon, dirinte, ke li pere de tiu gesto plenumas la deziron de multaj geesperantistoj.

Post la fino de la solenaĵo estis okazigita bonega vespermanĝo al ĉeestantoj.

SANTO ESTEVÃO (BA) — En tiu urbo gvidas esperantan kurson s-ano Manuel Borges Filho, en "Colegio Polivalente" al 30 gelnantoj. Ni dankas la sciigojn kaj deziras sukceson al niaj geamikoj el Bahia.

MURITIBA (BA) — Prof-ro Manuel Borges dos Santos informas nin, ke la loka "Emissora Radiovox" 1580 Kc. ĉiusabate, de la 21-a ĝis la 22-a horo prezentas "A voz do Esperanto". Liaj kunlaborantoj estas liaj gefiloj Ismael, Sonia kaj Aristides. Kvankam oni diras, ke "Sanktulo de Hejmo ne faras miraklon", laŭ brazila proverbo, jen tre bela kaj imitinda familia agado.

Sincere ni ĝojas pro la sukceso de nia diligenta vicprezidanto. Gratulon kaj kuraĝe antaŭen!

Jen bela soneto de s-ano Borges dos Santos, verkita kiam li alveturis al Uberaba por la Seminario tie okazinta ĉijare:

SUR LA MONTARO DE MINAS GERAIS

Ne plu la ombro de la nigra tristo
estu turment'al via juna korol' . . .
Ni estas, nun, sur la montartrezoro
kaj sub la beno le l'amata Kristol' . . .

Natura verdo estas la konsisto
de la minasaj kampoj - la koloro . . .
Aero pura, vivo sen doloro,
ŝajnas al mi ke ĝojas la ekzisto!

Salutu, do, ĉi landon de Feliĉo,
plena de Am', Espero kaj Riĉo,
kie brazila koro kantas, vibras . . .

Ne nur la Riĉo de la mondo tera,
sed ankaŭ tiu de la Lum'Etera,
kiu la homan vivon ekvilibras.

- x - x - x - x - x -

VITÓRIA (ES) — Kun grandega ĝojo ni ricevis vivosciiĝojn el ŝtato Espírito Santo, kie ekzistas la Kapiŝaba Esperanto Asocio, fondita en la jaro 1963-a, sed ĝis nun ne konata de ni, aŭ ne aktivis.

Ĝia prezidanto, s-ano Gilson Villas Boas Passos nun fariĝis nia kunlaboranto, kaj BKE lin nomumis vicprezidanto por la fako "Disvatigado kaj Instruado de Esperanto". Ni tre ĝojis pro la komuniko pri ĝia estraro:

Prezidanto: Gilson Villas Boas Passos

Vicprezidanto: Edson Luiz Gomes

1-a Sekretario: José Ayres Ventura

2-a Sekretario: Sebastião Oliveira Gomes

Kasisto: Paulo Castelar Perim

Bibliotekistino: Maria Amelia Leite Passos

Propagand-Direktorino: Cristina de Souza Ventura

Ni deziras sukceson kaj longan frukto-donan laboron.

- x - x - x - x - x -

BRASÍLIA (DF) — Nia nova vicprezidanto pri radiamatorismo, inĝeniero Enivaldo Alves da Silva, sendis al ni interesan artikolon pri sia fako, sed pro manko de spaco ni ne povas ĝin publikigi, bedaŭrinde.

En Brazilo estis fondita en la jaro 1963-a la Brazila Radiamatora Esperantista-Klubo — BREK. Ni dankas al nia amiko la afablajn vortojn rilatajn al nia porbultena laboro, cetere ni scias, ke li same batalas en nia movado.

Li apartenas al LKK por nia UK en 1981.

- x - x - x - x - x -

BARRA MANSA (RJ) — Barra Mansa Esperanto-Klubo - BAMEK - ĉiam agra-

ble surprizigas nin pro ĝia aktiveco kaj precipe pro la imitinda laboro de la familio Deslandes.

Estis elektita nova estraro por la klubo kaj ni rimarkas, ke denove, iu virino gajnis gvidpozicion en nia movado.

Jen la nova direktoraro de BAMEK:

Prezidanto: . . . Idé de Oliverira Ebeling

Vicprezidanto: Pedro Albeirice da Rocha

1-a Sekretario: . Denise Arneiro Deslandes

2-a Sekretario: . . . Ecy da Silva Ferreira

Kasisto: Wilson Pereira Deslandes

Bibliotekisto: Tobias Ferreira

Kontrola Konsilantaro: Prezidanto - Alberto Flores,

1-a Membro - Sergio Pereira Asunção kaj

2-a Membro - Elzo Gonçalves de Oliveira.

Dankegon pro la invito.

Ni gratulas la novan estraron de BAMEK, dezirante fruktodonan Laboron.

- x - x - x - x - x -

La gazeto "O Lder" el Barra Mansa aperigas ofte bonegajn artikolojn verkitajn de nia juna s-ano Pedro Albeirice, informante pri la agado de BAMEK. Ni gratulas al nia juna s-ano pro lia entuziasma laboro. Daŭrigu tiel, ĉar Esperanto meritas.

- x - x - x - x - x -

CAÇAPAVA (SP) — La informoj de nia senlaca kaj afabla vicprezidanto Majoro Gilberto A. Silva Velho, ĉiam estas bonegaj kaj utilaj al nia anaro.

En la urbo Suzano (SP), prof-ro Euclydes Carneiro gvidas Esperanto-Kurson, ĉe la Fakultato "Geraldo Rezende", laŭ sciigo de nia vicprezidanto, kaj tiu kurso komenciĝis la 15-an de septembro pasinta. Ni deziras plenan sukceson al la nova batalanto.

Majoro Silva Velho kontaktas esperantistojn tra la tuta lando. Li korekte komprenis la celon de BKE, kunlabori kun ĉiuj kaj grandigi la Esperanto-Movadon en nia belega kaj progresema lando. Li kunlaboras ankaŭ kun pluraj gazetoj kaj propagandas pri Esperanto ĉie. BKE kore dankas lian laboron.

- x - x - x - x - x -

RIO CLARO (SP) — Rio Claro Esperanto-Klubo kunlabore kun São Paulo Esperanto-Asocio organizis la 5-an esperantan regionan renkontiĝon en tiu bela urbo.

La prezidanto de la klubo, s-ano Ademar do Nascimento Alves, per fortostreĉa laboro klopodas pligrandigi la movadon en Rio Claro. Lin helpas s-anino Elvira Fontes, prezidanto de S. Paulo Esperanto-Asocio.

La eventon partoprenis ĉirkaŭ 100 personoj. La urbestro, D-ro Demerval da Fonseca Nevoeiro Junior kaj D-ro Paulo Ozorio de Oliveira, direktoro de la Departemento pri Edukado kaj Kulturo de la Komunumo ĉeestis.

La renkontiĝo, sub la respondeco de nia vicprezidentino Elvira Fontes, kiel ĉiam, bone sukcesis. Gratulon!

- x - x - x - x - x -

SÃO PAULO (SP) — São Paulo Esperanto-Asocio estas unu el la plej aktivaj organizaĵoj en nia lando. Ĝia diligenta kaj kompetenta prezidantino, Elvira Fontes, organizas kaj gvidas kunlabore kun aliaj gesamideanoj bonegajn kaj efikajn kursojn. Partoprenas ŝian laboron la jenaj gesamideanoj: prof-ro Nelson Silveira, eks-prezidanto de la asocio, Francisca Martos, kaj kursoj por korespondado. Intersatoj sin turnu al adreso: Avenida São João, 1333 - CEP 01.035 - São Paulo (SP).

Ĉiulasta sabato de la monato okazas kulturkunveno farata de nia vicprezidanto José Dias Pinto, al kiu ĉeestas multaj aŭskultantoj. La prelegoj estas edukaj kaj distrigaj samtempe.

La 29-an de septembro, tamen nia redaktorino Maria Almada, estis invitita prelegi pri la 64-a Universala Kongreso en Lucerno, Svisujo, al kiu ŝi ĉeestis, kune kun s-inoj Fanny Dupré kaj Guiomar A. de Aquino, kun sukceso.

Irrante al São Paulo, gesamideanoj, vizitu nepre la sidejon de la Asocio, kiu vendas bonegajn librojn. La efika laboro de la sanpaŭlanoj estas imitinda.

En la sidejo de APE ekzistas ŝakludistoj, kiuj serĉas novajn anojn tra la tuta

lando. Ŝakistoj, volu vin turni al APE kaj bonan sorton!

- x - x - x - x - x -

SOROCABA (SP) — La tria junulara renkontiĝo okazos en la venonta januaro, de la 23-a ĝis la 27-a. La kasisto estas s-ano Pedro Roman Sanches - Caixa Postal 234, CEP 18.100 - Sorocaba (SP).

La aliĝkotizon oni sendu per poŝta mandato aŭ per ĉeko pagebla en Sorocaba. La kotizoj ĝis la 31-a de oktobro 79 kostos Cr\$ 200,00; poste, Cr\$ 300,00.

Gejunuloj ĉiuaĝaj aliĝu al la renkontiĝo, pliriĉigante la junularan movadon!

- x - x - x - x - x -

VOLTA REDONDA (RJ) — Antaŭ kelkaj tagoj la geedzoj Almada vizitis la familion Flores en tiu bela urbo, kun bonŝanco, ĉar tie troviĝis la gesinjoroj Ary Zamora el Porto Alegre (RS), gepatroj de s-ino Clecy Zamora Flores.

Kun nia kunlaboranto, D-ro Flores, ni interŝanĝis ideojn kaj petis lin organizi interfratigan tagmanĝon por la solena fermo de nia kongreso. Li tion sukcesis fari dum unu tago ĉe la estraro de la Siderurgia Kompanio, dank'al lia prestiĝo ĉe la organizaĵo.

Nia vicprezidanto daŭre instruas Esperanton ĉe la Fakultato. Li estas ankaŭ kunlaboranto de la loka gazeto "Sul do Estado". Ni kun plezuro legis lian artikolon titolitan "Conversando com os Jovens", kiun ni trovis laŭdinda.

- x - x - x - x - x -

MONTE APRAZÍVEL (SP) — La bone konata prof-ro Benedicto Silva, kiu loĝas en tiu urbo, sciigis nin ke li komencis disvastigi Esperanton inter la rotary-anojn. Liverkis bonajn artikolojn kaj publikigis ilin en la revuo "Brasil Rotary". La 5-an de septembro de la kuranta jaro li faris prelegon pri Esperanto en la "Centro Comunitário" de la urbo Macaúbal, invitita de la lernejestro. La prelegon aŭskultis 200 personoj.

Li nun planas kurson en la urbo Ja-

les (SP).

Nia kara vicprezidanto kaj kunlaboranto jam tradukis plurajn spiritismajn librojn kaj verkaĵojn esperanten. La fama verko de José de Alencar "Iracema" estas ankaŭ de li tradukita kaj eldonita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Tiu verko estis lanĉita okaze de la Seminario okazinta en Fortaleza (CE) en 1974. Temas pri rekomendinda legaĵo, kiun vendas la Kultura Kooperativo de Esperantistoj - Caixa Postal N° 1887 - CEP. 20.000 - Rio de Janeiro (RJ) kaj São Paulo Esperanto-Asocio, Caixa Postal n° 5888 - CEP. 01.000 - São Paulo (SP).

Ni sincere ĝojas pro la novaĵo, ĉar ĝi signifas, ke en Monte Aprazível la movado fortiĝas kaj floras. Kuraĝon, antaŭen!

- x - x - x - x - x -

PORTO ALEGRE (RS) — Prof-ro D-ro Ivo Sanguinetti, dissendis demandilojn al la anaro en tiu ŝtato pri la nombro de esperantistoj. La ideo de nia kunlaboranto estas trafa ĉar ni urĝe bezonas scii kiom da esperantistoj ekzistas en nia lando. La tasko estas tre interesa kaj ni petas ĉiujn gesamideanojn, volu kunlabori kaj sendi la respondon al la nia vicprezidanto Sanguinetti, laŭ la adreso: Rua Barão do Amazonas, 41/101 - CEP 90.000 - Porto Alegre (RS). La informon oni bezonas por nia 66-a UK okazonta en Brazilja (FD). Kiom ni nombras?

- x - x - x - x - x -

KAMPANJO PRI SIDEJO

Pro la foresto de nia financa direktoro, kiu ĉeestis la UK en Eŭropo, nia monkoklektado aperos en nia bul-teno n° 49. La afero marŝas kontentige!

PORTO ALEGRE (RS)

Nia vicprezidanto, D-ro M. Belmonte de Abreu kunlaboras konstante kun ni. La "Jornal da Manhã" el Uberaba aperigas longan artikolon pri Esperanto, de li verkita. Ĵurnalisto kaj verkisto, D-ro Abreu estas senlaca batalanto por Esperanto. Ni dankas liajn kunlaboraĵojn.

- x - x - x - x - x -

S. SEBASTIÃO DO CAÍ (RS)

S-ano Otto Vaske, same, nia vicprezidanto kaj kunlaboranto, agadas diligente. Pere de li farita, cirkulero propagandas nian movadon., dissendata tra Brazilo. Ĝia enhavo klarigas pri la internacia lingvo kaj rekomendas la elementan lerno-

libron "Esperanto Elementar", de nia prezidanto, kion ni dankas.

S-ano Vaske verkis libron pri sia aviadila vivo, kiun li intencas eldonigi. Ni deziras sukceson al nia kara vicprezidanto, kaj ke li publikigu tuj sian libron, kiu devas esti interesa.

- x - x - x - x - x -

RIO DE JANEIRO (RJ)

"Trovás, Trovinhas e . . . Trovões"

S-ino Elma do Nascimento sendis al ni sian libron, sub tiu titolo, kiun ni trovas tre interesa. Ĝi estas aĉetebla en la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro (RJ), Caixa Postal Nº 1887 CEP. 20.000.

ALIĜILO

Pere de Banka Ĉeko aŭ Poŝtmandato oni sendu la monon al kasistino MARIJA POZDER ALMADA — Rua Galeão Carvalho, 31, apto. nº 73 — Santos (SP).

KOTIZOJ

Ĝis la 31-a de decembro 1979:

Plenkreskuloj	Cr\$ 300,00
Akompanantoj (edzino)	Cr\$ 200,00
Junulo (ĝis 25-jara)	Cr\$ 50,00

Post la 31-a de decembro 1979:

Plenkreskuloj	Cr\$ 400,00
Akompananto (edzino)	Cr\$ 300,00
Junulo (ĝis 25-jara)	Cr\$ 100,00

Aliĝanto:

Adreso:

Urbo: CPF: Ŝtato:

Akompananto:

Rimarko: Utiligu ĉi tiun parton de la Bulteno, ĝin sendante kune kun la ĉeko, poŝtmandato aŭ alimaniere. La kvitancon de la sendita mono ni faros per bulteno, surlistigante la nomojn de la enskribintoj.

